

Januaro 2021

ESPERANTO-INFORMILO

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- La jaro 2021
- Literaturaĵoj
- Diversaĵoj



© ĉe liggraphy sur Pixabay

Kolofono

redaktoro: Anina Stecay
as.esperanto@web.de
korektinto: R. Pflüger

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

Vorsitzender: Martin Schmitt

Gießener Str. 18

35415 Pohlheim

Tel. 06403/ 9690878

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M

IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01

BIC: DRESDEFFXXX

bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

mit DEB-Beitrag: 96 €

Familienmitglied: 48 €

Nur ESF: 24 €

Familienmitglied: 12 €

Programo

Klubvespero

Klub-Abend

Donnerstag, d. 7. Jan. 21

ĵaŭdon, la 7-an de jan. 21



Statuo de Alexander Selkirk, kies vivo inspiris D. Defoe

© JTMorkis sur Pixabay

19:00 h

Robinson Crusoe (U. Fellmann)

Der Roman gehört zu den bekanntesten weltweit und wurde sogar in einige der indianischen Sprachen übersetzt. Was fasziniert uns so an ihm? Und wurden die Figuren und Abenteuer vom Autor erfunden, hat er sie aus anderen Geschichten entlehnt, oder beschrieb er darin eine reale Person und ihre Erlebnisse? Welches Verhältnis besteht zwischen dem Roman oder dem vielleicht wirklichen Robinson und der sogenannten Robinson-Insel im Pazifischen Ozean?

Ulrich Fellmann wird versuchen, diese Fragen bei unserer nächsten Videokonferenz zu beantworten. Als Kind erbte er von seinem Großvater eine noch in Fraktur gedruckte Ausgabe des Romans, den er in jungen Jahren öfter als zehnmal gelesen hat.

19:00 h

Robinson Kruso (Felmano U.)

La romano estas unu de la plej mondwide konataj kaj tradukita eĉ al indianaj lingvoj. Kio tiom fascinas nin? Kaj ĉu la aŭtoro kreis la figuron kaj la aventurojn el si mem, ĉu li ĉerpis el aliaj rakontoj, aŭ ĉu li priskribis realan personon kaj ties realajn spertojn? Kiel rilatas la hodiaŭa tielnomata Robinsoninsulo en la Paca Oceano al la romano - aŭ al la eble vera Robinsono? Tiujn demandojn provas Felmano Ulriko respondi dum la sekva retkunveno de nia klubo. La prelegonto kiel infano heredis de avo frakturitan version de Robinsono Kruso, kiun li junaĝe estas leginta pli ol dekfoje.

Naskiĝtagoj

En januaro festos siajn naskiĝtagojn:

Elisabeth Rabenstein, 11.01.

Reinhard Pflüger, 16.01.

Hartmut Horeth, 20.01.

Martin Schmitt 21.01.

Helga Perlwitz-McMahon, 30.01.

Ni kore gratulas!

La jaro 2021

Kio atendas nin en 2021?

Ke ni neniam povas vere antaŭvidi kia estos la venonta jaro, montris 2020, kiu por la plejmulto el ni evoluis certe komplete malsimila al niaj imagoj, kiujn ni havis dum Silvestro 2019/2020. Tamen estas la espero, ke kun la novaj vakcinoj iam dum la jaro 2021 la situacio iom renormaliĝos, tiel ke ni espereble povos reveni al nia rutino. Sub tiu kondiĉo, mi volas mencii kelkajn aferojn, kiuj supozeble markos la jaron.

- Financoj:
 - o En Germanio la tielnomata „baza pensio“ efektiviĝos ekde 1.1.21; oni devas pagi pli da aŭtomobila imposto, aliflanke ricevas pli da subteno por infanoj, kaj por homoj kun salajro sub 62.000€/j la solidarec-kontribuaĵo forfalos.
- Kulturo: Kelkaj interesaj ekspozicioj okazos en la frankfurtaj muzeoj, kiujn oni – espereble – finfine povos baldaŭ denove senlimige ĝui:
 - o pri Beckmann kaj lia tempo en Städel (tio komenciĝis jam meze de decembro 2020, sed pro la „lockdown“ oni ĝis nun fakte ne povis viziti ĝin),
 - o granda Rembrandt-ekspozicio fine de la jaro en Städel,
 - o pri Paula Modersohn-Becker en Schirn,
 - o kaj tre interese la ekspozicio „Formi la estontecon – kiel ni volas vivi?“ pri futuraj vivmanieroj en Senckenberg-muzeo, kiu jam daŭris dum la tuta jaro 2020, sed kompreneble ofte devis esti fermita.
- Sporto: Okazos la Eŭropa Konkurso de piedpilko kaj la Olimpikaj Ludoj, kiujn oni ŝovis de 2020.
- Esperantujo:
 - o Espereble ĉi-jare la renkontiĝoj denove povas okazi, tiel ke nin atendas la UK en Belfasto, la jarkongreso de GEA, kaj la jarfinaj rekontiĝoj kiel NoRo kaj Luminesk' kaj JES.
 - o La frankfurta klubo devas translokiĝi al nova ejo Saalbau Schönhof, kiu laŭ la plej novaj informoj pretos por ni ekde februaro 2021.
- Pro „ronda“ naskiĝ- aŭ mortdatreveno estas bona okazo honorati:
 - o la verkistojn F. Dostojewski († 1821), G. Flaubert (*1821), F. Dürrenmatt (*1921), P. Highsmith (*1921), W. Borchert (*1921), H. Mann (*1871), Ch. Baudelaire (*1821), Ch. Morgenstern (*1871), H.G. Wells († 1946),
 - o la kontraŭnazian rezistantinon S. Scholl (*1921), la politikistinon Rosa Luxemburg (*1871),
 - o la sciencistojn H. von Helmholtz (*1821), E. Rutherford (*1871) & R. Virchow (*1821),
 - o la artiston L. Feininger (* 1871),
 - o la muzikistojn I. Strawinsky († 1971), Cl. Schumann (†1896), E. Humperdinck († 1921), C. Saint-Saëns (†1921) kaj J. Morrison († 1971),
 - o la mariston F. Magellan († 1521) kaj
 - o pastron S. Kneipp (*1821)
 - o Krome oni decidis plilongigi la Beethoven-jaron ĝis septembro 2021, ĉar multaj koncertoj kaj eventoj ne povis okazi pro la viruso.

Naturo de la jaro

Ĉiun jaron organizaĵoj elektas la plej gravan birdon, planton, kuracplanton, papilion ktp. de la jaro. Jen mi prezentas kelkajn elektitojn por la jaro 2021.

Bedaŭrinde mi trovis kelkajn nomojn nek per STEB, nek en NPV, pro tio mi en tiu kazo tradukis la scienca nomon kaj markos tion per #.

La **kuracplanto** de la jaro estas la **kreno** (*Amoracia rusticana*). Ĝi kreskas en humidaj loko, en Germanio ekzemple en la Spreewald-regiono, bone rezistas kontraŭ malvarmo (eltenas temperaturojn ĝis -50°C), kaj entenas multajn vitaminojn en konsiderinda kvanto (vitaminoj C, B1, B2, B6). Pro tio ĝi helpas i.a. kontraŭ skorbuto. Ĝian sanigan efikon jam konis la romianoj. Plinio la Maljuna ekzemple priskribis la bonan efikon sur la cerbo.

La esperanta vorto por la planto venas cetere escepte ne el la latina, sed laŭ Vikipedio el la rusa – tamen ankaŭ en la aŭstra-germana oni diras „Kren“, ĉar vorto el slava lingvo envenis jam la malnovgermanan kaj iĝis „chren“.

La **papilio** de la jaro iĝis la **bruna arktio** (sc. *Arctia caja*, germ. *Brauner Bär*), kiu teorie videblas inter julio kaj septembro, sed estas noktaktivulo kaj pro tio apenaŭ rimarkata. Ĝi vivas en tuta Eŭropo ĝis Laponio, en Azio kaj Nordameriko; ĝi manĝas herbojn kaj ekzemple foliojn de saliko. Per la atentokaptaj flugiloj ĝi fortimigas siajn predantojn.

Kiel **beston** de la jaro oni nomumis la **eŭropan lutron** (germ. *Fischotter*, sc. *Lutra lutra*). Ĝia korpo estas proksimume 90 cm longa, aldoniĝas 40-centimetra vosto, kaj ĝi pezas proks. 10 kg kaj apartenas al la musteledoj. Ĝi vivas ĉe malprofundaj river(et)oj kun apudaj malsekaj ebenaĵoj, kie ĝi povas ĉasi fiŝojn, ranojn, kuniklojn ktp. Krom de la homo, ĝi estas predata de lupoj kaj linkoj. En Germanio ĝi estas protektata kaj apartenas al la minacataj specioj.

La **floro** de la jaro iĝis la sufiĉe modestaspekta **#oficina sangosorbulo** (germ. *Großer Wiesenknopf*, sc. *Sanguisorba officinalis*). La planto troveblas en tuta Mez-Eŭropo kaj ĝis Orient-Azio kaj kreskas sur relative humida tereno. Kiel oni povas rekoni el la nomo, la planto en la pasinteco estis uzata kiel kuracplanto; ĝiaj tanaĵoj helpis fini sangadon kaj plibonigis diareon, tamen laŭ modernaj sciencaj esploroj la kuraca efiko ne estas vere alta. Hodiaŭ oni uzas ĝin ankoraŭ en homeopatio.



© foto el Wikipedia de Pethan CC-BY-SA 3.0



© foto el Wikimedia de jp HAmor CC-BY-SA 3.0



© foto el Wikipedia de Bernard Landgraf CC-BY-SA 3.0



Bildo: publika havaĵo, el Vikipedio

Blua luno

(de Ulriko Felmano)

Hodiaŭ estas plena luno. Preskaŭ mi estus forgesinta... sed tio min memorigas: estas sabato, hodiaŭ ni ja kunvenos! La vorto luno memorigis min. Kiomas? Jam temp' está. Kie estas miaj vestaĵoj? La ĵinzo! La sole ebla ĵinzo! Kie? Ankoraŭ ŝi forgesis remeti ĝin en la ŝrankon. Eble tiun mi povas... sed tiel mi ja ne povas iri... hrmp... ĉiam la sama. Sed tiu ĉemizo funkcias. Ne havas tiom da tempo nun, jam malfruas, la aliaj certe estos ĝustatempe antaŭ la diskoteko. Ek! Silentu, ke ŝi ne aŭdu vin... ŝi certe starigos sensencajn demandojn, kiel ĉiam. Mi do lasas la ĵinzon. La ŝtuparo. Mi ne ŝaltas la lumon. Mallaŭte... la pordo... bone, ekstere, sed kie estas la biciklo? Damne... la domzorgisto... ĉiam denove! Tiu teda oldulo... prefere mi prenu la vojeton kaj piediru, anstataŭ serĉi, kien li metis la ciklon. Iru.

La ĉirkaŭo ja lastafoje multe ŝanĝiĝis, kaj hodiaŭ la vojo iom sentiĝas pli longe, sed mi devas hasti por trafi ilin, antaŭ ol ili eniras. Ili ja kutime atendas nur dek minutojn. La konatoj, amikoj, amikinoj. Precipe pri Katleen mi nun pensas... hodiaŭ mi diros al ŝi... se ne hodiaŭ, kiam do? Baldaŭ la lernejotempo estos finiĝinta, kaj do mi ne plu atendu... sed estas ja Roberto... mi ne povas eĉ finomi lin, li estas ja vere bona ulo, kaj li simple demandis ŝin pli frue... li ne eĉ estas en ŝia klaso. Kaj mi sidas ekde klasofino rekte malantaŭ Katleen kaj Heike, spektas ĉiutage ŝian belan pugon, sed ne aŭdacis... kvankam ŝi ofte alrigardis min, kvazaŭ ŝi atendus ion de mi... Sed venis iam Roberto, antaŭ ses monatoj, kaj li simple demandis ŝin. Jen. Tie estas la diskoteko.

La Blua Luno. Tiel ili nomis ĝin post du jaroj de provizora uzo de la eksa sporthalo kiel diskejo por la urbeta junularo. Iĝis nia vivcentro, almenaŭ semajnfine. Sed kio? Malluma? Neniu homamasoj? Kio okazis? Kial neniu informis min? Ĉu ni ne hieraŭ post la lernejo staris kune, kiel ĉiam, babilantaj, kaj fine adiaŭis, kiel ĉiam? "Ĝis la!" kaj "Ĝis morgaŭ en la Blua Luno!" Sed nun... Nekonata paro iras proksime. Ŝajne ne de ĉi tie, kie oni ja konas ĉiun. Mi alvokas ilin, "ĉu ĝi hodiaŭ estas fermita?" Ili ŝajnas surprizitaj.



© ĉe Nidan sur Pixabay

"Korona!" diras li. Ŝi diras al sia kunulo: "sed ĝi jam fermiĝis antaŭ longa tempo!" Strange. Korona? Kio estas tio?

Ĉu iu aĉetis la konstruaĵon kaj finis la funkciadon de la diskoteko? Korona estas biera speco, kompanio... Sed kial neniu diris... hieraŭ...

Kaj kiel ŝi povas diri "longa tempo", se ŝi ne estas de ĉi tie? Sentiĝas strange. Fremde. Io ne estas en ordo. Mi alvoku Heinz aŭ Rainer telefone. Sed kie estas la telefonbudoj? Ĉi tie, apud la enirejo de la Blua Luno, estas ili. Sed ne estas. Mankas. Ĉu ili ne lastsemajne ankoraŭ tie staris? Mi malbonsentas min. Tio ne estas en ordo. Iu komplete misfariis ion. Kaj neniu menciis hieraŭ... Hieriaŭ?

Mi iru rekte al Rainer. Li loĝas plej proksime. Certe malfermos la pordon kiel ĉiam lia bonkora patrino, kiu foje invitas min kuntagmanĝi kaj preparas la plej bonan ruĝan brasikon kun buloj kaj rulaĵviando. Ĉio malenigiĝos.

Mi trairas la malluman strateton. Eniras la iomete lumigitan Josef-Schmitt-straton. Pasas la papervendejon de s-ino Kaserer, kies ne plu lumigita fenestro montras skribilojn, librojn... Proksimiĝas al la ŝuvendejo Zehnder. La montrofenestro... mi vidas en ĝi alproksimiĝantan personon. En la fenestro. Oldulon, certe 80-jaraĝan. Spegulas. Sed kie estas mi? Ne... ne... tio ne eblas... kio okazis al mi?

Pika damo

(de Ulriko Felmano)

Aleksandro iam amis
Kvar malsamajn inojn
Trefa regantin' reklamis
Forton, povon, vinojn.

Aleksandro iam amis
Kvar malsamajn inojn
Pika damo transsilvanis
Sendis plen' magiojn.

Aleksandro iam amis
Kvar malsamajn inojn
Kera junulin' prezentis
Belon, amon, seksojn.

Aleksandro iam amis
Kvar malsamajn inojn
Karo'-ino ja meditis
La mondpacajn bonojn.

Puŝkin' ne elekti volis
Diris: kvar ja bonas
Pika dam' malsamkonsentis:
Vin mi do detruas!

Puŝkin' ludis en kazino
Kontraŭ mon' kun kartoĵoj
Kreskis eke la profito
Fine estis larmoj.

Baldaŭ tamen li komprenis
Kial tiu fino venis
Lin ensorĉis Pika damo
Liajn kartoĵojn - tute samo.

Pensis li momente vere
Droni sin apud-rivere
Sed tuj venis bona penso
Skribu libron mi per menso.

Fine evidentis ke
Pika damo venkis ne
Verku vi literaturon
Lasu tiel vian spuron.

Diversaĵoj

Enigmo

Ŝajnaj kunmetaĵoj

Pluraj el vi certe memoras la tre bonan Lingvan Rondon el oktobro, kiam Reinhard Pflüger prezentis kelkajn ŝajnajn kunmetaĵojn, t.e. vortoj, kiujn oni povus disigi al kelkaj radikoj kaj sufiksoj donantaj al la vorto tute alian sencon ol la originalan – tre konata ekzemplo estas: grupo de grandaj koloj = kol-eg-aro

Ĉu vi trovos la sep ĝustajn esperantajn vortojn, kiuj kaŝiĝas malantaŭ tiuj ŝajnaj difinoj?

- 1) se la 13. litero de la alfabeto estas distanca
- 2) komenco de malgranda enir-permeso
- 3) la ĉefo de alpa vento
- 4) esti ekstere, amindume parolanta
- 5) promeno, kiam oni forlasas la trian plej lastan literon de la germana alfabeto
- 6) divers-seksa paro el longaj kaj maldikaj lignopecoj
- 7) se ajno estas erara

Solvo de la decembra enigmo

Vi povis malĉifri tiujn kvar kristnaskajn kantojn:

Sur arb' kristnaska (Am Weihnachtsbaume die Lichter brennen)

Abio vi (Oh Tannenbaum)

Paca nokt', sankta nokt' (Stille Nacht, heilige Nacht)

El alt' ĉiela venas mi (Vom Himmel hoch da komm ich her - mi pardonpetas pro la eraro en la lasta vorto!)

Ĉi-foje Gundhild Schäfer kaj Hilde Stecay ensendis la ĝustan solvon kvazaŭ samtempe.

Vorto de la monato

La vorto, kiun mi elektis ĉi-foje, estas „**klostro**“ – laŭ NPIV: *Kovrita promenejo ĉirkaŭ interna korto de monaĥejo, katedralo ks, kun muro ĉe la ekstera flanko k kolonaro, arkadaro aŭ fenestraro ĉe la interna.* En la germana: Kreuzgang.

Ŝerco

Baniko suspektas, ke lia edzino trompas lin, dum li laboras en sia oficejo. Kruko donas al li konsilon: “Metu sub la liton poton da lakto. Ligu al la somiero kuleron super la poto. Vespere, se vi trovos spurojn de lakto sur la kulero, tio estos pruvo de via kokriteco.”

La sekvan tagon Kruko renkontas Banikon kaj demandas lin:

“Nu, kion vi trovis sub la lito?”

“Poton plena da freŝa butero.”

(el: Kruko kaj Baniko el Bervalo, de Louis Beaucaire)